

# THE Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 9.

JANUARO, 1909.

PREZO 3 PENCOJ.

## UNIVERSALA LINGVO.

Ĉu estas dezirinde ke la tuta homaro parolu ununuran lingvon estas tro vasta temo por sufiĉe pri-trakti en la limoj de paragrafo. La kunkonsento de opinio estas, ke por ĉiuj komercaj kaj praktikaj celoj, tio estus nepra profito. Negoco kaj komerco estus multege faciligitaj, kaj la progreso de l' scienco, l' esplorado, kaj, eble, ankaŭ de misiista penado estus helpata. Estas ankaŭ eble ke se ĉiuj popoloj de la mondo povus interkompreni sin re iproke perfekte per la perilo de komuna lingvaĵo, multaj nuntempaj neeviteblaj internaciaj malfacilaĵoj ĉesus ekzisti. Kontraŭe, tamen, kredeble fariĝus granda malgajno de tio, kion ni povas nomi nacia individueco. Grandamezure estas vere ke "la lingvaĵo estas la popolo." kaj tial komuna lingvo kredeble okazigus ĝeneralan malprogreson en nacia literaturo. Estus kompreneble mondliteraturo, sed estas dube ĉu tio leviĝus al la altecoj atingitaj de Shakspeare, Goethe, Racine, Cervantes, aŭ Dante. Tamen la alpreno de internacia helpa lingvo, kia estas Esperanto, alportus ĉiujn suprecititajn profitojn, ne tuŝante la nacian individuecon. Eĉ de literatura vidpunkto Esperanto povas iomete fanfaroni, ĉar multe da naciaj ĉefverkoj jam estas tradukitaj Esperanten, kaj post nemulte da jaroj la biblioteko de ĉiu esperantisto entenos la plej legindajn verkojn de ĉiuj nacioj. Neniam ni forgesu ke la genia elpensinto de la lingvo Esperanto, krom ĉio ĉi, havis apartan celon, kiu enkorpiĝas en la glora ideo Esperantismo, kiu tiom signifas por ĉiuj veraj esperantistoj, ripetante denove la antikvan anĝelan senditaĵon, — "Paco sur la tero; bonvolo al l' homaro."

## A UNIVERSAL LANGUAGE.

Whether it is desirable that all mankind should speak one language, is too large a subject to adequately deal with within the limits of a paragraph. The consensus of opinion is that, for all commercial and practical purposes, it would be an unailing advantage. Trade and commerce would be enormously facilitated, and the progress of science, exploration, and, possibly, also of missionary endeavor would be helped. It is also possible that if all the peoples of the earth could understand each other perfectly through the medium of a common speech, many present unavoidable international difficulties would cease to exist. On the other hand, however, there would probably be a great loss of what we may call national individuality. To a great extent it is true that "the speech is the people," and hence a common language would probably bring about a general decadence in national literature. There would be, of course, a world-literature, but it is doubtful whether it would rise to the heights attained by Shakspeare, Goethe, Racine, Cervantes, or Dante. Nevertheless the adoption of an international auxiliary language such as Esperanto would bring all the above-mentioned advantages without touching the national individuality. Even from a literary point of view Esperanto can somewhat boast, for many national masterpieces have already been translated into Esperanto, and after a few years the library of every Esperantist will contain works best worth reading of all nations. Let us never forget that the ingenious inventor of the language, besides all this, had a separate object, which is incorporated in the glorious idea Esperantism, which means so much for all true Esperantists, repeating anew the ancient angelic message:—"Peace on earth, goodwill toward men."

## PRI MIA EKSKURSO. (daŭrigo)

de MAY D. HARRISON.

Mi vojaĝis vaporŝipete laŭ la rivero Tweed, 30 mejlojn, kaj vizitis Murwillumbar-on. Ĉi tiu urbeto tute detruigis de fajro en Septembro 1907, sed unu jaron poste ĝi estas tute rekonstruita, kaj la domoj, hoteloj kaj butikoj estas tre belaj, kaj plisimilas tiujn de granda urbeo ol tiujn de kamparurbeto. Sur la riverbordo kreskas miloj da palnoj kaj filikoj en sia natura stato. Mi elfosis kelke da palmoj kaj ili kreskas bone ĉe mi. Post dek tagoj mi reveturis Brisbanon, intencante reveni al mia kara hejmo, sed mi denove ekmalsaniĝis, kaj ne povis tion fari. Tial mi revenis al la bona, bela vaporŝipo Wyreema kaj vojaĝis al Cooktown (elp. Kuktaŭn). Brisbano estas tre bela urbo, kaj oni povas tramveturi kaj vidi tre belajn vidaĵojn, sed la vetero estis nebona, kaj mi ne estis sana. Mi tre multe ĝuis la marveturon; marmalsanon mi ne konas, kaj la maro estis tute trankvila. Mi estis surprizita vidi tiom da grandaj urboj inter Brisbano kaj Cooktown; Townsville, Cairns, k.c. Dum mia halto ĉe Cairns mi vizitis la akvofalon Barron. Mi ne povas priskribi kiel bela kaj mirinda estis la veturo. Mi ekiris vagonare el Cairns frumatene, kaj veturis al Kuranda. Preterpasante la akvofalon Stoney Creek mi soifis, kaj la konduktoro bonkore haltigis la vagonaron kaj havigis al mi trinkaĵon, kaj kiam ni alproksimiĝis la akvofalon Barron li denove haltigis la vagonaron kaj demandis min kaj du aliajn vojaĝantojn ĉu ni deziras viziti la falon. Kompreneble ni tion deziris, tial li detenis la vagonaron ĝis kiam ni sufiĉe rigardadis la grandiozan, belegan vidaĵon; tiam obeante al averta fajfo de la lokomotivo, ni revenis al la vagonaro. Tute proksime de la fervojo kreskas plej belaj arboj, palmoj, bananoj, ananasoj, papawoj, granatarboj, k.c. Ni traveturis 15 tunelojn kaj transpasis grandegajn profundegaĵojn, sed ne atentis dangeron, ĉar la vidaĵo estis tiel ravega. Proksime de la hotelo staras dometo en kiu montriĝas mirinda kolekto da papilioj kaj skaraboj, pli bela ol iuj kiujn mi antaŭe vidis; kelke da specimenoj havas 9 kolorojn da longo,

kaj la koloroj estas mirindaj, tiel delikataj kaj diversaj. Mi revenis al la ŝipo, tre laca sed ankaŭ tre kontenta pro la belegaj kiujn mi vidis. Oni ne bezonas vojaĝi alilanden por trovi ravegajn pejzaĝojn. Daŭrigota.

## KORESPONDADO.

De Sr-o. E. A. Millidge:—"En via artikolo 'The Fate of a Traitor,' Okt-a. No. de via ŝatata ĵurnalo, mi rimarkis iom malagrablan eraron kiun, mi estas certa, vi volonte eĉ ĝoje korektos. Jen—S-ro. de Beaufront tute ne estis la verkisto de 'Esenco kaj Estonteco,' sed anonima aŭtoro 'Unuel' kiun ĉiuj kredas esti D-ro. Zamenhof mem. Sendube la stilo estas tiu de D-ro. Z, neniel tiu de L. de B. D-ro. Z. en 'la Revuo' diris ke L. de B. ne estas ĝia aŭtoro, sed iu anonima aŭtoro."

De F-rino. Tilly Aston:—"Eble interesos viajn legantojn, ke Esperanto disvastiĝas inter niaj geblinduloj. Dum ĉirkaŭ sep jaroj mi uzis ĝin por kolekti sciigojn pri blindulaj movadoj en fremdaj landoj, kaj ĝi tre utilis al mi. Mi treege deziris ke aliaj geblinduloj havu saman plezuron kaj profiton, tial mi decidigis unu blindan sinjoron lerni Esperanton. Li laboradas ĉe la Laborejo, kaj inter multe da blinduloj; kaj li baldaŭ varbis kvin el siaj kunuloj por studi la lingvon. Ili nun havas tre interesan grupon inter si, kaj mi helpas kiam ili bezonas pli da instruado ol la juna instruisto povas doni. La manko de legado ĝenis nin tre multe, sed S-ro. Adams de Hastings, Anglujo, bonvole nun sendas al mi libretojn, kaj rakontojn, kiujn mi unue legas, kaj iafoje kopias, kaj poste rondirigas inter miaj blindaj lernantoj. Krom tiuj, mi havas eble dekduon da blindaj korespondantoj en Aŭstralio kiujn mi instruas poŝte. Unu estas ne nur blinda sed tute surda. Mi ofte pruntas al ili miajn fremdajn leterojn kiuj alvenas de multaj landoj, ekz. Svedujo, Svisujo, Bohemujo, Brazilo, kaj aliaj. Mi ĝojas diri ke Esperanto rapide disvastiĝas inter la tutmonda blindularo, kaj eble servas nin pli ol la vidulojn."

S-ro. C. F. White:—"Mi estas tre kontenta sciigi al vi ke malgraŭ la projektoj tiel ruze malkaŝitaj al la Esperantistoj de la memnomitaĵo

'reformuloj,' la glora afero ĉiutage kreskas. Kompreneble, interna milito estas ĉiam pli danĝera al iu ŝtato ol fremdaj atakoj. Tamen la ĝisnuna rezultato nur povas malvarmigi la cerbojn de la malkontentemuloj. La Esperantistaro restas fidela. En Anglujo, ne eĉ unu propagandisto kaptiĝis; en Francujo, niaj samideanoj tre sentas la perfidecon de sia konata samlandano, kaj pro tio, ili forte pligrandigas siajn klopodojn; en Germanujo, dank' al la Kongreso, la novaj Esperantistoj amasiĝas; la Slavaj nacioj ĉial malŝatas la ŝanĝojn. Vi bone scias ke mi estas en la vicoj de la progresemluloj. Sed, unue oni devas min konvinki. La proponataj ŝanĝoj, laŭ la opinioj de la pleraj kleraj kaj fervoraj Esperantistoj --kaj mi mem, kvankam nova Esperantisto, post atenta esploro konsentas kun ili-- detruus la lingvon, se oni povus enkonduki ilin, kaj malaperigus la laboron de dudek jaroj. Mi ripetas la vortojn de la Majstro: 'Neniu privata persono, neniu societo havas la rajton fari ŝanĝon en nia Fundamento. La momento en kiu ni ektuŝus al tiu ĉi principo, estus la komenco de nia Morto.' Kaj, se mortus Esperanto, la tuta homaro malfidus al la ideo de iu ajn lingvo internacia. Libertempo mankas al ĉiuj, kaj neniu deziras akiri senutilaĵon, kaj konstante ŝanĝiĝanta lingvo estus senutilaĵo. Tial restu ni fidelaj; mi estas tute certa ke miaj nun tre malproksimaj samideanoj restas fidelaj. Oni povas haltigi la progresadon de la internacia ideo; oni povas haltigi la movadon por la interfratiĝohoma. Sed neniu povos en la dudeka centjaro pereigi aŭ la unuan aŭ la lastan. Posedante vivantan internacian lingvon, ni havas la ŝlosilon kiu malfermas la pordojn al ni en ĉiulando sur la terglobo. Kiom signifas Esperantismo al ni! Kiom ĝi signitos al niaj nepoj! Ĉi tiuj benos la nomon Zamenhof, kiu oferis sian genion al la alligado de la homaro. Fine, oni diras al mi ke la Majstro espereble visitos la kongreson en Usono, 1909 an. Sur la muro estas geografcarto, kaj mi rimarkis ke li povus revenante hejmen viziti Aŭstralion. Jes, mi tion rimarkis. Ĉu vi?"

De S-ro. Edward Parker:—"Mi kredas ke mi forĝesis diri al vi ke mi premis la manon de D-ro. Za-

menhof en la nomo de la Aŭstraliaj gesamideanoj. Ve! tiu samideano estas por vi ĉiuj nekonata, ĉar bedaŭreginde via amiko S-ro. C. F. White ne povis iri al Dresdano kaj mi estis nur anstataŭanto.

### MIA MALGRANDA MUNGO.

Fervoja oficisto lokita en Hindujo en loko kie sin trovis grandnombre venenaj serpentoj, unu nokton, duonvekiĝinte konvinkiĝis ke ĵus lin vizitis inkubsonĝo. Sonĝe ŝajnis al li ke oni surmetis multpezan ŝarĝon sur lian korpon. Ĉiufoje kiam li enspiris, li sentis ke ĝi premas lian bruston ĝis iom post ion li tute vekigis kaj trovis ke li kuras surdorse. Li ankoraŭ konvinkiĝis ke li havis inkubsonĝon, kaj li ĉirkaŭrigardis la ĉambron kiun dubelumigis la frua matenbrilo. Tiam liaj pensoj sin turnis denove al la "io" kio premeĝis lin en sonĝo. La konscio ne forigis tion. Ĉe ĉiu spiro li sentis ke li levas ian misteran substancon. Li etendis manon kaj ektuŝetis glacian malvarmajon. Samtempe li ekaŭdis koleran siblon kaj rapide retiris la manon. Malproksime apenaŭ du futojn de liaj okuloj li ekvidis la kapuĉan, flavbrunan, streĉitan kapon de kobro. Li sentis ke la fajraj okuletoj trapiakas lin trae. Lia spirito estis klara, sed estis io en tiu kruela rigardo kiu kvazaŭ ŝtonigis lian korpon. Pasis minuto kaj la kobro mallevigis en siajn volvaĵojn. Ĉe tiu prokrasto la espero ekrevivis en la viro. Ĉu li devus atendi ĝis kiam la rampaĵo ekdormos, kaj tiam riski rapidan forkuron? Pasis duonhoro, almenaŭ tiel ŝajnis al li pro la grada plilumigo en la ĉambro. La oficisto iom moviĝis, sed responda movo de la ŝarĝo avertis lin ke la kobro ankoraŭ maldormas. Tiam venis al li ideo en la cerbon. Li komencis fajfi mallaŭte. La serpento ekmoviĝis, sed baldaŭ rekuŝiĝis kvietigite evidente de la sono. Pasis alia duonhoro; ankoraŭ fajfadis la viro kun okuloj zorgeme rigardantaj la malfermitan pordon de la ĉambro. Tiam mallaŭta skrapbruo penetris liajn orelojn. En la pordkrado staris griza besteto simila al duonputoro, duonkato. La malgranda mungo kiun li malsovaĝigis kaj instruis respondi al sia voko, alvenis ĝustatempe por savi al li al vivon. Post momento la mugno

ekvidis la serpenton. tuj saltis sur la lito kaj ekkaptis la rampaĵon je la nuko. La batalo estis mallonga, kaj kun sento de profunda emocio la oficisto saltis el la lito kaj brake cirkaŭprenis la malgrandan mungon. Noto.—Ĉi tiu besteto estas zoologie Herpestes, Mungo, (angle Mon-goose) kaj troviĝas en Hindujo. Malgraŭ sia natura sangavideco ĝi estas facile malsovaĝigebla, kaj fariĝas dolĉa, amema dombesteto.

### KIAMANIERE MI FARIĜIS ESPERANTISTO.

Anstataŭ longtempe paroli pri Esperanto, mi volas mallonge rakonti al vi, kiamaniere mi fariĝis Esperantisto. Tiam vi vidos, kial oni devas fariĝi Esperantisto. En la jaro mil naŭcent tria, mi, komentante vojaĝon tra la Oriento, troviĝis en la manĝevagono, kiu veturigis min de Bukaresto al Konstanca ĝis la maro. Jen mi rimarkis sinjoron, kiu vane klopodis por klarigi ion al la kelnero. Tiu ĉi aplikis ĉiujn siajn lingvajn konojn kaj parolis rumane, serbe, turke, bulgare kaj ruse! Vane! La fremdulo ne komprenis. Mi, preta por helpo, alproksimiĝis—mi parolas krom la rumana ankoraŭ sep aliajn lingvojn—kaj mi demandis germane, france, angle, itale, poste hungare, hispane kaj greke, kiamaniere mi povas helpi lin. Ĉio vana! La nekonato ne komprenas unu el tiuj dekdu lingvoj! Tiam mi rememoris pri jurnala artikolo pri Esperanto, kiun mi legis, dubante, autaŭnelonge kaj demandis: "Ĉu vi parolas esperante?" Krio de ĝojo! "Jes, mi parolas; kaj li daŭrigis en lingvo, kiun nun mi ne komprenis, ĉar per tiu ĉi unu frazo mia kono pri Esperanto estis limigita. Apenaŭ la fremdulo tion rimarkas, kiam li scias la rimedon. Li enmetis en mian manon malgrandan libreton en angla lingvo, unu el la tiel nomataj Esperanto-ŝlosiloj ekzistantaj en preskaŭ ĉiuj lingvoj, k.uj. kvankam pezante nur kvin gramojn, tamen enhavas la tutan gramatikon kaj la vortaron; kaj nun la lernado komencis. Kiam post 10 horoj ni revidis nin sur la ferdeko de l' vaporŝipo, mi povis jam sufiĉe komprenigi min per Esperanto, laŭ mi sciigis, ke mia nova kunvojaĝanto, Svedo,

ankaŭ posedis kvar lingvojn, nome krom la sveda, la norvegan, danan, kaj finlandan! La fremdulo, la kelnero kaj mi, ni kune povis paroli dekse lingvojn kaj tamen ne povis interkompreniĝi! De tiu tago mi estas entuziasmigita Esperantisto, kaj se tiam en Rumanujo estis eble nur unu, mi hodiaŭ staras tie ĉi en la nomo de sepcent anoj de help-lingvo internacia kiu almitos la mondon. ĉar ĝi estas necesajo, kiun mi volis prui rakontante tiun malgrandan historieton.

HEINRICH FISCHER.

### ALILANDAJ GAZETOJ RI- CEVITAJ.

LUMO, Monata Revuo por la Lingvo Internacia, Esperanto, Organo de l' Bulgara Esperantista Ligo. Redakcio, Tirnovo, Bulgarujo. Kosto de l' jara abono 3-50fr. Enhavas priskribon de la 2a Bulgara Esp. Kongreso en Sumeno, tre interesan. "Eh Esperantista," monata aldono de l' "Echo" Berlin. SW, Dessauerstr. 1. Enhavo, "Io pri belsonco," interesa artikolo de N. P. Evstieieff. La Kvara, kun fotografajo de la akcepto de D-ro. Zamenhof per la reprezentantoj de la urbestro de Meissen.

LA REVUO, Novembro. Interesa daŭrigo de rakonto, "Marta," de Eliza Orzeszko, trad. D-ro. Z; Elokventa prediko de l' aŭto Pichot ĉe la dresdena kongreso; tre interesplena artikolo pri balonoj kajflugmaŝinoj de Emmanuel Aime; raporto pri postkongresaj festoj de F. de Menil. k. t. p.

ESPERANTO, Oficiala Organo de la Universala Esperanto-Asocio. Duonmonata Internacia Gazeto. Direktoro, Hector Hodler, 8 Rue Bovy-Lysberg, Geneva. Enhavas multe da ĉiulandaj sciigoj pri la afero.

RUMANA GAZETO ESPERANTISTA. Oficiala organo de la Unua Rumana Societo Esp. Laŭ peto ni represiĝas aliloke paroladeton, "Kiamaniere mi fariĝis Esperantisto."

# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. I. N-RO. 10.

FEBRUARO, 1909.

PREZO 3 PENCOJ.

## ALVOKO AL NIA LEGANTOJ.

La unua jaro en la vivo de nova gazeto estas ĉiam kriza, kaj precipe kiam ĝi celas la propagandon de ia nova ideo. La antaŭtimoj kiujn ni sentis komencante ĉi tiun gazeton estas pli ol rajtigataj. Ni jam konstatis ke el la malmulte da esperantistoj aŭstraliaj, ankoraŭ malplimulte sufiĉe interesas sin por helpi al la sola organo esperanta en la kontinento. Do, ankoraŭ unu fojon plu ni insiste alvokas al niaj legantoj ke ili donu al la redakcio la necesan helpon por fari la gazeton pli interesa kaj pli profita. Devas ofte okazi ke vi aŭskultas spritan anekdoton, aŭ havas en la menso materialon por artikoleto. Kial do ne skribi ĝin eĉ angle, se vi ne havas la kapablon ĝin skribi en Esperanto. Tiamaniere ni povos eviti la unu-tonecon kiu pli aŭ malpli frue forigos la sukceson de ia gazeto. Pli kaj pli la nacia gazetaro atentigas la publikon al la gravaj progresoj farataj de la Zamenhofa lingvo. En la lasta tempo aperis en la "Strand Magazine" fantazia artikolo pri esperanta urbo ĉe Moresnet, kaj antaŭ ne longe la "Sydney Bulletin" enpresigis du leterojn aludantajn favore la aferon. Ni ne devas forgesi citi la instruajn artikolojn aperintajn en la melburna "Herald," kaj esperas ke tiu grava ĵurnalo daŭrigos la eldonon de tiaj propagandaj paragrafoj. Kiel fidelelaj esperantistoj ni devas klopodadi laŭ pleja povo por la disvastigado en Aŭstralio de nia kara afero.

## AN APPEAL TO OUR READERS.

The first year in the life of a new gazette is always critical, and especially when it aims at the propaganda of any new idea. The apprehensions which we felt in commencing this gazette have been more than justified. We have found that out of the few Australian Esperantists, still fewer interest themselves sufficiently to contribute to the sole Esperanto organ in the Continent. Once more, then, we earnestly appeal to our readers to give to the Management the necessary assistance to make the gazette more interesting and profitable. It must often happen that you hear a witty anecdote, or have in your mind material for a little article. Why then not write it, even in English, if you are not capable of writing it in Esperanto. In that way we can avoid the monotony which sooner or later will do away with the success of any gazette. More and more the national press is calling the attention of the public to the important progress that is being made by the language of Zamenhof. There appeared recently in the "Strand Magazine" a fanciful article about an Esperanto city at Moresnet, and not long ago the Sydney "Bulletin" printed two letters alluding favorably to the affair. We must not forget to mention the instructive articles that have appeared in the Melbourne "Herald," and hope that that important newspaper will continue the publication of such propaganda paragraphs. As faithful Esperantists we must continue to labour to the utmost for the spread of our beloved Cause in Australia.

## PRI MIA EKSKURSO.

de MAY D. HARRISON.

(daŭrigo).

Mi tiam veturis al Cooktown kie mi pasigis unu tagon. Ĉi tiu urbo havas belan sidon sed estas tre malgranda; la loĝantaro konsistas el hinoj, japanoj enlandanoj kaj kaproj! La klimato estas varmega, sed ne tiel malagraba kiel mi supozis ĉar refreŝiga vento blovadas la tutan tagon. La loĝantoj, same kiel ĉiuj Queenslandanoj, estas tre afablaj kaj serve naj al ĉiuj vizitantoj. La butikoj estas nerimarkindaj. Mi eniris ĥinan butikon, sed la butikisto anstataŭ reklami siajn komercaĵojn, pridemandis min pri mi mem, de kie mi venis, kie mi loĝas, k.c., sed kiam mi memvole faris aĉeton Johano ne malzorgis pri la pago, li tute ne forgesis tion. Multe da enlandanoj troviĝis sur la strato (nur unu longa strato kiel estas kutime en kamparaj urboj). La infanoj estas tute nevestitaj, sed la plenkreskuloj devas vesti sin kiam ili envenas la urbon; tamen ili portas nur unu veston sur la nigraj korpoj, kaj tuj kiam ili forlasas la urbon ili lasas tion. La knaboj sin vestas per mallonga supervesto kaj pantaloneto inter kiuj montriĝas la ventro, brilanta kvazaŭ polurita. La virinoj estas malpuraj kaj ne interesaj; ili fumas (dank' al la blankuloj, mi timas), kaj unu maljunulino plimalpurigis siajn harojn per argilo kiom ŝi alglugis al la ekstremajoj de siaj bukloj. Mi demandis la kuiristinon de la sola restoracio pri la malpurulino, kaj ricevis klarigon ke tiu virino estas ploregulino. La geblankuloj estas fortikaj kaj kontentaj. Nur unu kuracisto loĝas en Cooktown, kaj oni diras ke li ne havas grandan klientaron. Mi vidis la arbon al kiu ŝipestro Cook alligis sian boaton kiam li vizitis ĉi tiujn bordojn en la jaro 1770a. Mi vizitis ankaŭ la botanikan ĝardenon kaj promenis sub la samspecaj arboj kiaju mi vidis en la kamparo. La kokosarboj estis fruktoportaj, kaj mi pagis nur po unu penco por granda kokoso. Mi ueniam antaŭe vidis kokosojn sen la ekstera ŝelo. La ĝardenisto tre afable petis min akcepti kelke da kreskaĵoj, sed mi respondis ke mi ne posedis la tutan ŝipon, nur unu ĉambreton, sed li insistis ke mi

prentu kelkajn kreskaĵojn kaj semojn kion mi danke faris. Sendube Queenslando estas mirinda ŝtato kie povas kreski ĉiaspecaj kreskaĵoj, kaj la belegaj koloroj de la foliaro estas tute ravegaj. Tamen kiam mi revenis ĉe mian karan hejmon, kaj revidis la belajn rozojn kaj aliajn sudajn florojn, mi konvinkiĝis ke nia ŝtato estas la plej bona el ĉiuj.

Fino.

## KORESPONDADO.

George Collingridge, Hornsby, N.S.W., writes as follows:—"As far as I am aware, the Esperanto movement in my locality during the past year was as follows:—Gosford Club (affiliated with the B.E.A. founded in June. President, Geo. Collingridge; sec. and treas., P. J. Holdsworth; in all 17 members. Meetings of members of this Club have been held weekly since its foundation, with an average good attendance, and good progress has been made. I have given lectures at Gosford, Chatswood and Hornsby, and induced scores of young people to study the *Helpa* language. An *Esp. Illus. Magazine*, the "Australian Verda Stelo," was issued in August, and has now reached its fourth number. It is published at irregular intervals—every little while—and has a fairly good circulation in Australia, whereas outside Australia it has subscribers, and goes to such countries as England, France, Spain, Italy, Belgium, Germany, Switzerland, Russia, the Phillipine Islands and the U.S.A.; and inquiries concerning it have been and are coming in from other lands."

The Hon. Sec. of the Benalla (Vic.) Club reports that during the past year the number of members has more than doubled itself, and that 25 now meet every Wednesday evening at the Shire Hall. Nearly two-thirds of the members are young people, and they are making rapid progress. A class is held before the regular business is entered upon, and instruction given to the newer members. During 1908 the Club has made a translation of Oliver Goldsmith's comedy "The Good-natured Man," and is now revising it with a view to publication.

S-ro. P. P. Fewings, Brisbano, skribas:—"Mi treege bedaŭras esti

devigata diri ke la esperanta afero en tiu ĉi ŝtato dum la pasinta jaro ne estas antaŭenirinta. Jen estas ĉirkaŭ 15 personoj el kiuj konsistas la klubo. Tiuj ĉi estas pli-malpli entuziasmaj. Ili ĉiuj posedas fremdajn korespondantojn en diversaj partoj de l'mondo. La klubo ne kunvenas nun, ĉar la ĉeestantoj estis tiel malmultaj. . . . Ĉe la komenco de la pasinta jaro la nombro de la membroj estis pli ol 20. La publiko havas nenian intereson en nia afero. Ili estas tute indiferentaj. Ili aŭskultas, tion kion oni diras por Esperanto, levas la ŝultrojn kaj foriras. Tiel ĝi finiĝas. Mi sciigas de la librovendisto ke estas personoj kiuj aĉetas esperantan literaturon sed ne aniĝas de la klubo. Ili plivolas resti aparte. La stato de nia afero tie ĉi estas temo kiun mi ne deziras priskribi ; ĝi estas tro malhela.

From Cedric F. White.—“To the Editor of the Australian Esperantist. Thinking that general news of the movement is better in English, with your permission I will write you a weekly or fortnightly letter so that such items as you judge of interest may be included in your journal probably before you see them in the other gazettes. —The movement steadily grows ; slowly, perhaps, to us more enthusiastic mortals, but if only one looks back ten years, or even five, the headway is marvellous, when it is remembered that no financial support has been accorded outside the members themselves.—I am more and more impressed with one thing, that through Esperantists themselves not taking more trouble to become proficient, they much hamper progress. I know an Esperantist who is a diplomate and who says that talking is a bore. I know also loyal members of clubs who never miss a meeting, and yet, while perfectly able to follow all the proceedings, are not able to talk fluently. This is just as wrong as anything could be. This week I met a Frenchman with a shockingly imperfect knowledge of English, but who spoke Esperanto very well, and who learned without either teacher or friend with whom to practice. The absolute best form of propaganda work is to know

Esperanto oneself. “How long did it take you to learn?” is a frequent question. We SAY that one can acquire a working knowledge in three or four months, and this is true, even if only an hour or even less is spent per day. Think then of the effect on the mind of a probable recruit if an Esperantist has difficulty in conversing after twelve months, or maybe two years, and we know this is not uncommon.—Have recently been present at two delightful receptions, one at the house of Mr. Sharp, assistant secretary of the London Club, and the other an “at home” given to celebrate Zamenhof's birthday by Mr. and Mrs. Felix Moscheles to the members of the London Club, of which Mr. Moscheles is president. Esperanto part singing, solos and recitations of course form the principal part of the entertainment provided, and these functions do a great deal to bring Esperantists together and prove the value of the language.—Have recently been to two Esperanto dances, one at Whetstone under the auspices of the Norda Stelo Klubo, and another at the home of a lady member of the London Club. At the last named evening a most interesting little comedietta was played by half a dozen young girls. They are all supposed to meet by arrangement at a restaurant prior to taking a pleasure trip through Germany. Unfortunately when the company assembles it is found that only one, the German, can speak the National language. Tears and dismay follow, as a matter of course, because the pleasure of the trip will be spoiled. One, however, speaks a few words in Esperanto, and finds that all the rest understand, and immediately the representatives of England, Germany, Poland, France and Italy fraternise, and they start out rejoicing.—A big concert and propaganda meeting is to take place at the North London Polytechnic. The principal performer on the programme, which I enclose, is Mr. Harrison Hill, a very clever society entertainer, who recently caught “Esperantitis.” Not only will he give some English numbers, but will contribute to the fun with something in the Esperanto way.—London, November, 1908.

A.F.L., Bundaberg, Q. Bonvolu ripeti vian demandon kiun ni bedaŭrinde forgesis, kaj oni ĝin respondos senprokraste en la gazeto.

I.G.N. Vi ĝis nun pagis 2/5. Dankon.

### KLARIGO.

En la famkonata novelo "La Faraono" tradukita de Dro. Bein (Kabe) troviĝas kelkaj frazoj kiuj povus mistifiki legantojn. Aperas du ŝajne novaj vortoj "tombi" kaj "vulno." Dro Bein, responde al unu korespondanto, diras ke tiuj estas skriberaroj, kaj ĉevis esti "fali" kaj "vundo." En la frazoj:—"ĝis kiam mi ne humiligos ĉi tiun hebreinon," "ĝis kiam miaj servistoj ne ĉesos min rigardi kun timo," "Permesu ke mi ne kredos je tiu Likon, ĝis mi mem ne vidos lin," "ne" estas uzita erare. En la frazo, "Mi timas ke iu ne venenu miajn mangajojn en la kuirejo;" la uzado de "ne" aŭ pli ĝuste "ke ne" post "timi" estas demando ne tute klara, do dume, eble pli bone estus diri "mi timas ke iu venenos." "Dekkelko" signifas "dek kaj kelke," same kiel "dek du" signifas "dek kaj du," "dekduo." "Kelkdeko" signifas "kelke da dekoj," same kiel "dudek" signifas "defojdek," "dudeko." "Kontroli" signifas "esplori, ĉu io estas vera, bone farita."

### ALILANDAJ GAZETOJ RICEVITAJ.

LA BELGA ESPERANTISTO, organo de la Belga Esp. Ligo. red. L. Champy. 49 Kleine Beerstraat Antverpo. Jarabonprezo, Sm. 1. 80. INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO, Oficiala organo de la Internacia Asocio de Instruistoj. Red. Th. Čejka, Byrtrice-Hostyn. Moravio. Jarabonprezo, 1 Sm. BRAZILA ESPERANTISTO, Oficiala organo de "Brazila Ligo Esperantista." Redakcio, Rua S. Jose N. 77. Jarabonprezo, 2. 40. LA DU STELOJ, Oficiala organo de la "Ĉila Esperantista Asocio." Jarabonprezo, 2 Sm. Bonega duobla numero de TRA LA MONDO, enhavanta artikolojn pri La Fraŭlino Aŭstralia; ankaŭ artikolojn pri la vivado kaj moralo de Lev. Tolstoj. La fotoĝrafajoj estas vere admirindaj.

### RECENZO.

Ni jus ricevis broŝureton "Kiel ni plibeligos la vivon" originale verkita de "Saĝulo." La aŭtoro pritraktas la sekvantajn temojn: Nutrado, Loĝado, Vestajoj, Laboro, Amuzado, Ĝenerala higieno, Seksaj rilatoj, Infanoj, Memstruado kaj Filozofio de vivo. Prezo: 0.25 Sm. ĉe Moller and Borel. Prinzenstr. 95, Berlin. S. Ni citas la jenan elĉerpajon el Memstruado: "Regulo estas: ne faru al alia homo tion kion vi ne volas, ke oni faru al vi mem, sed tiu ĉi regulo bezonas multe da pripenso. Estis du najbaroj, de kiuj unu posedis najtingalon kiu ĉiumatene kantis je frua horo kaj vekis sian posedanton kaj lian najbaron. Tio tiel malplaĉis al la najbaro, ke li fine aĉetis birdon, sed strange—nun la matena kanto ree malplaĉis al antaŭa posedanto. Ili nun kiel ekstreme saĝaj najbaroj konsentis herigi la najtingalon. La moralo de tiu ĉi anekdoto estas, ke multo estas agrabla al vi, se vi ĝin faras, kio estas tre malagrabla al vi, se alia persono ĝin faras. Povas plaĉi al vi frapadi tablon per la fingroj, sed multe malplaĉi al alia aŭskultanto."

### ANTAŬZORGEMO.

Antaŭ ne longe landadministranto en la okcidento de Irlando renkontis kampanon, kaj, aŭdinte pri lia edziĝo, lin tiel salutis:—

"Nu, mia viro, ĉu vi estas preninta al vi edzinon?"

"Jes, via moŝto," diris la irlandano, tuŝante sian ĉapelon, "mi estas."

"Feliĉegulo! Mi mem ne povas trovi iun, kiu volas edziniĝi kun mi, kaj ofte mi sentas min tre malĝaja."

"Mi kredas, ke mi povos helpi vian moŝton," diris la kampano.

"Kiamaniere?"

"Faru kiel mi faris, iru tien kie oni vin ne konas!"—E. C. Walker.

### NEŬZEBLA DOLARO.

"Ĉu vi eble havas dolaron per kiu vi ne scias kion fari?"

"Jes, jen unu."

"Dankon! Sed pardonu, ĝi ja estas falsajo."

"Nu do, ĉu vi ne petis unu per kiu mi ne scias kion fari?"—E. Ĉefeĉ.



# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 11.

MARTO, 1909.

PREZO 3 PENCOJ.

NIA PLEJ TAŬGA DEVIZO,  
"ANTAŬEN."

Ĉiu esperantisto en sia propra sfero devus ne nur pripensi pri la antaŭenirado de la esperanta afero en sia ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ sin okupigi je la antaŭenpuŝado de ĉiu ideo havanta similan celon. La epoko kredeble estas ankoraŭ tre malproksima kiam ni, aŭ prefere, niaj nepoj, sin gratulos pri la plenumiĝo de la deziroj de la Majstro. Sed neniam la esperantistaro lasu sin akuzi pri malprogresemece. Ni do alligu al ĉiu antaŭema movado por ke la kontraŭuloj devige konfesu ke, ekster la Esperantismo, tamen, kiel ni ĉiuj bone scias, nedisigeble alligita al tiu ideo, kuŝas en ĉiu esperantisto la neforviŝebla devizo "Antaŭen," kiun senescepte alprenis la progresemuloj en ĉiuj epokoj. Ne estu kontenta observante la sukcesojn de la ĝenerala esperanta movado. Propre klopodu, malgraŭ via limigita sfero, kaj la ĝojo kiun vi sentos esperantistiginte unu skeptikulon nur estos komparbla kun la ĝojo sentita de la paŝtisto pri erarvaganta ŝafo kiun li sukcesis enŝafejigi.

ESPERANTISTA POŝKAL-  
ENDARO.

Ni kore rekomendas ĉi tiun oportunan libreton, kiun enhavas dataron kun spacoj por notoj kaj diversajn sciigojn interesajn por esperantistoj. Ankaŭ troviĝas Esperantista Gazetaro, kaj listo de Esp. Konsulejoj, Delegitoj, (U.E.A.) Grupoj, Hoteloj, k.t.p. Prezo, Sm. 0.40. Moller kaj Borel. Berlin. S. Prinzenstr. 95.

OUR MOST SUITABLE DEVICE,  
"FORWARD."

Every Esperantist in his own sphere ought not only to think about the advance of the Esperanto Cause in his neighborhood, but also to occupy himself in the pushing forward of every idea having a similar aim. The time is probably still very distant when we, or rather our grandsons, will congratulate themselves on the fulfilment of the Master's desires. But never let the Esperantist Body allow themselves to be accused of stagnation. Let us then unite ourselves to every movement with a forward tendency in order that the enemy may be compelled to confess that, outside of Esperantism, although as we all well know, indissolubly united to that idea, there dwells in every Esperantist the ineffaceable device "Forward," which the progressives of every age have invariably adopted. Let us not be content watching the successes of the general Esperanto movement. Make your own efforts in spite of your limited sphere, and the joy which you will feel converting one sceptic to Esperantism is only comparable with the joy felt by the shepherd over a wandering sheep which has succeeded in getting into the fold.

## NOTICE.

All Communications in connection with this Journal to be addressed to the Editor, Dr. A. E. Barrington, Benalla, Victoria, Australia.

## RAPORTOJ.

Plezure mi raportas ke la melburna Esperanta Klubo progresadas kontentige. La financa stato estas bona, kaj la nombro de geanoj plimultiĝas ĉiumonate. En la daŭro de la pasinta jaro pli ol kvindek novaj geanoj elektigis. Certe de tiu ĉi fakto oni devus kredi ke la klubo baldaŭ enhavos centojn da membroj, sed bedaŭrinde tia nombro ne estas ankoraŭ trafita. Kelkaj membroj foriris Melburnon dum 1908, kaj pro diversaj kaŭzoj aliaj forlasis la klubon. Sekve estas nur tuto de ĉirkaŭ cent ses geanoj nuntempe. Tridek estas la meznombro de ĉeestantoj ĉe la ĉiusemajnaj kunidoj kiuj havas lokon vendredojn ĉe la Assembly Hall, Collins Str.

Fino. B. Dacomb. Kasistino.

Adelaide.—En Oktobro de la pasinta jaro, la anoj de la kurso de S-ro. Uhlraub decidis ke la tempo estas matura fondi grupon por la ĉi tiea pli bona disvastigado de nia kara lingvo. Nia intenco estis bone reklamita, kaj ĉe la kunveno nia fervora batalanto S-ro. C. A. Uhlraub unuanime elektigis Prezidanto. Estis decidite aliĝi al la B.E.A. Post longa kristnaska libertempo la anoj revenis kun nemalpliigita fervoro, intencante pligrandigi siajn nombrojn antaŭ la jarfino. Iaj sugestioj pri efektivaj propagandaj metodoj estos danke akceptataj. La kunvenoj okazas ĉiulunde je 7.30. p. t. m. en la Teosofia Ĉambro, Victoria Square. La Sekretario estas W. D. Smith, Mail branch. G.P.O.

Invercargill, Nov-Zelando.—La progreso de Esperanto en tiu ĉi urbo ne estas rapida. Kiam fondiĝis la grupo en 1906, oni konfide esperis grandan sukceson, sed tio ne tute efektiviĝis, ĉar kelkaj grupanoj sur kiuj ni apogis la plej grandajn esperojn, foriris el la regiono, kaj aliaj forfalis de "gracio". Tamen la entuziasmoj regule kunvenas ĉiusemajne dum la du pasintaj jaroj. Ni intencas starigi oficejon (lokala) de U.E.A., ĉar tiel ni kredas ke granda helpo al nia afero rezultos. Estas multe da vojaĝantoj fremdaj kiuj trapasas nian urbon jare, precipe dum somera sezono, kaj tiuj sendube utiligus nian oficejon por akiri informojn pri kvartalaj kaj disriktaj detaloj. Nuntempe ni

kalkulas dudek (20) plenaĝajn grupanojn. La estro de unuagrada lernejo instruis dekkvin gelernantojn, kaj deĉi tiu ili sukcesis plenumi ekzamenon de B.E.A., kaj ricevis atestojn.

Reginald MacKinnon.

Waiburton, Victoria.—Fraŭlino L. A. Ward writes:—"Esperanto has been on vacation with us until last Wednesday evening, when we held a reunion at 'La La.' About 20 members met, and after business, a very friendly evening was spent. We meet every alternate Tuesday evening in the future, and hope to get the Hall for our meetings."

## ELĈERPAĴOJ.

Nebabilemaj viroj estas la plej indaj.— Shakspeare.

Nenia vento utilas por tiu kiu ne havas celhavenon.— Montaigne.

Ĉiu faru sian taskon; la rikolto prizorgos Alia ol li.— Carlyle.

Malsaĝuloj neniam konscias pri tio, ke la indeco kaj la bonŝanco iras kune.— Goethe.

Ĉie troviĝas urtikoj; tamen ankoraŭ pli universala estas la glata verda herbo.— Browning.

Kiu per sia tuta koro intencis bonfaron, tiu faris bonfaron eĉ se li mortus antaŭ ol li elfinus ĝin.—

Stevenson.

Manko de sufiĉe bona kialo por fari ion fariĝas bona kialo por lasi ĝin resti nefaritan.— Scott.

Per fortaj vortoj eldiru nun vian hodiaŭan pensadon, kaj ankaŭ per fortaj vortoj eldiru morgaŭ vian morgaŭan pensadon, eĉ se ĉi tio malus ĉion hodiaŭ diritan.—

Faru bonon laŭ via tuta povo, kaj diru ĉiun veron kiun vi aŭ scias aŭ kredas; cetere, paciencu, submetiĝu, cedu; Dio faras Sian aferon, ni do faru nian.— Emerson.

La vera venkado ne estas tio, ke ni modelu eksterajn aĵojn laŭ nia volo, sed tio, ke ni nian vivadon travivu pacience, fideme, aminde tra kiaj aĵoj estos la eksterajoj.—

Brooke Herford.

Ĉiama sindoneco al tio, kion nomas homo sia komerco, elteniĝas nur per ĉiama malzorgo pri multaj aliaj aferoj. Kaj ne estas certege ke la komerco estas la plej grava el homaj okupaĵoj.— Stevenson.

Tradukis, Plumpuŝanto.

## LEGENDO PRI LA KRIZ- ANTEMO.

La japanoj rakontas la jenan interesan legendon pri la deveno de la krizantemo. En ĝardeno trem-piĝanta en la dolĉa lunlumo, juna knabino deŝiris floron kaj komencis senigi ĝin je petaloj por sciigi ĉu ŝia fianĉo amas ŝin fidele. Subite antaŭ ŝi ekaperis dio, kiu certigis ke ŝia fianĉo—ŝin amas pasie. “Via edzo vivos,” ĝi aldonis, “tiom da ĵaroj, kiom da petaloj havas la floro kiun mi al vi permesas elekti.” Dirinte tion, ĝi malaperis. La juna knabino rapidis traserĉi la gardenon por floro kiu posedas multege da petaloj, sed ĉiu floro ŝajnis promesi nur mallongan estontecon por ŝia amato. Fine ŝi deŝiris persan dian-ton, kaj per helpo de ora pinglo eltirita el siaj haroj, ŝi partigis ĉiujn petalojn de la floro, tiamaniere pli-grandigante la nombron de folikloj kaj la nombron de ĵaroj difinitaj por ŝia fianĉo. Baldaŭ sub ŝiaj lertaj fingroj, cent, du cent, tri cent petaloj, delikataj, flekseblaj, kaj bele kurbiĝintaj, evoluciigis, kaj la juna knabino ekploris pro ĝojo, pripensante la feliĉan eston-tecon kiun ŝia ruzo certigis al ŝia fianĉo. Tiamaniere, diras la legendo, kreiĝis la krizantemo unu lunluman nokton en japana ĝardeno.

Esp. 16479.

## INTER MIAJ FREMDAJ KORESPONDANTOJ.

Tro multe da Aŭstralianoj pensas ke, pro nia malproksimeco de Eŭropo, Esperanto estas tute neutila al ili. Sed, inter la multo da utiloj de la lingvo internacia, certe la interŝanĝo de ideoj kun niaj frathomoj en aliaj landoj, kies lingvojn ni nescias, estas unu el la plej interesaj. Tiamaniere Esperanto malfermas la mi, Aŭstraliano, kiu ne scias ian lingvon krom Angla, novan mondon en korespondado kun alilanduloj, kies leteroj estas ĉiam bonkoraj kaj plenaj je intereso. Ni esperas ke iam venos la tempo kiam ni Aŭstralianoj plene komprenos la internan ideon de Esperanto, la frateco de homaro. Jen estas letero de hispano, kiu skribas el kampar-domo meze de orangarboj kun orkolora frukto inter la verdaj folioj, kaj kies balsama, bondora parfumo

faras ĉarma la loĝejon. Li pris-kribas la laboradon inter la oranĝarboj ĝis tagfino, kiam oni ĉeestas en vivendejoj kie troviĝas forte-pianoj, kaj ĉiuj ludas, habilas kaj kantas ĝis malfrua nokto. Tiu juna hispano aldonas ke li amas multe la poezion kaj ke lia amuzajo estas promeni kaj paroli kun fraŭ-linoj, kaj li petas ke mi sciigu lin “kiel edziĝas la gefianĉoj en Aŭstraliao, kaj kiel LI al ŜI faras la edziĝpeton!” La francaj samide-anoj skribas ĉiam pri sia fama Parizo, kiu estas gaja, hela kaj vivplena, la plej belega en la tuta mondo. Tamen, franco kiu bone konas Parizon, kaj laboradis tie dum la universala ekspozicio 1900a, aldonas ke bedaŭrinde troviĝas tro multe da ŝtelistoj kaj vagistoj kiuj lerte uzas ponardon, kaj en Parizo nuntempe oni ŝtelas kaj mortigas tagmeze, malgraŭ la senĉese kres-kanta nombro de policistoj. Kelkaj lertaj francoj opinias ke Esperanto estas certe pli fluanta ol la franca lingvo, sed itala korespondanto aŭ-flanke diras ke la lingvo internacia ne egalas la italan kiu estas la plej belsona en la mondo. Jen letero de juna germano el la norda parto de Germanujo kie la vintro estas mal-varmega. Mi pasigas—li skribas—la longajn vintrajn vesperojn antaŭ la forno en kiu gaje kraketas fajro: fŭmante longan piron mi sidas kaj legas dum ekstere la ventego blovas, kaj la neĝo dense falas. Tiu ĉi kor-espondanto amuzas min per la pri-skribo pri sia manĝajo, kvar-kvin manĝoj ĉiutage; sufiĉego da bulkoj, kolbasoj, rostajo, fromaĝo, buljono kaj biero. La proksima letero venas de juna studento en Svedujo kiu sendas al mi sian portreton en kiu li portas kolegian uniformon kaj en butontruo la verdan stelan, la signon kiu kunigas nin en amikeco. Estas vintro en Svedujo sed li neniam timas la froston! Ho!—li skribas kiom ĝi estas dolĉa, la nordlanda vintro, kiam la glacio kvietigas la ondojn de la lagoj, kaj la neĝo me-troprofunde kovras la teron. Sed, kredeble,—li aldonas,—vi, filo de pli sunriĉa lando, ne ŝatus nian vin-tron. Ni sportas multe per glit-ŝuoj kaj skioj. Neprovincintulo ne povas imagi kiom dolĉe estas rapi-dege gliti antaŭen sur la glacio de la lagoj, aŭ tra la neĝejoj en arbaroj kaj kampoj. Tiu svedo evidente

pensas ke Aŭstralio estas malgranda lando, ĉar li petas al mi sendi unu ekzempleron de ĉiu ĵurnalo eldonita en Aŭstralio! Alia samideano en norda Rusujo sendas en sia letero grandan, kuriozan rusan insekton (eble ĝi estas rusa moskito, mi ne scias) ankaŭ petas ekzempleron de ĉiu gazeto aŭstralia. Mi havas nun sub la mano interesa letero el Bulgarujo, la koverto kovrita per sep diversaj koloritaj poŝtmarkoj, kaj enhavanta priskribon pri la kulturo de la mirtelo, la rikolto de la rozo, (por parfumo) kaj la vinbero. Alia el Svisujo, (kaj mi trovas ke el ĉiuj miaj korespondantoj, la svisaj skribas la plej fluantan Esperanton) enhavante priskribon de la silktekstejoj en Zurich, kaj la fabrikado de horloĝoj en Genevo. Jen estas alia svedo, amanto de poezio kaj muziko kiu donas ĉarman priskribon de la vivo en tiu malproksima lando. Iru—li skribas—al kia ajn dometo en urbo kaj kamparo, kaj vi trovos ke almenaŭ unu el la familio traktadas ian instrumenton, ĝenerale violonon. La virinoj estas ravigaj kantantinoj kiam ili kantas akompanataj per gitaro. Imagu ke en luma mezsumera nokto vi sidas ĉe bordo de lago, ĉirkaŭata de grandaj montoj, kaj ke vi el la malproksimo de la trankvila la ravigajn tonojn de kantantino ripetatajn multfoje de la eĥo de la montoj; ho! certe vi forgesos ĉiajn malbonaĵojn de la peka mondo, kaj vi kredos ke vi estas en la ĉielo aŭskultante la kantojn de sanktaj anĝeloj! Fine, letero de lerta germana samideano, kiu skribas ĉiam la plej interesajn leterojn. Dum 20 jaroj li okupis sin en siaj liberaj horoj je la studado de fremdaj lingvoj. Tiel li lernis en la kuro de 17 jaroj la francan, anglan, italan, hispanan, portugalan, danan, svedan, hungaran kaj rusan lingvojn. Tiu emo por la studo de lingvoj igis lin studi ankaŭ Esperanton, kaj li antaŭ nelonge fondis Esperantan grupon en sia urbo.

H. Gadsden.

## ĈE LA PENTRAĴAREJO.

Onklino:—Jen estas pentraĵo, "La fruaj kristanoj jetataj al la leonoj."  
 Nevino:—Ho ve! Unu malfeliĉa leono ne havas kristanon.

## GAZETARO.

Ricevitaj. "Pola Esperantisto," "Tra la Filatelio," "Voĉo de Kuracistoj," "Germana Esperanto-Gazeto," "Espero," "La Spritulo," "Rumana Gazeto Esperantista," "Hispana Revuo," "Norvega Esperanta Gazeto," "La Verda Standardo," "La Sakso Esperantisto," "La Du Steloj," "Informaj Raportoj," "Brazila Esperantisto," "Filipina Esperantisto," "Eĥo Esperantista," "La Esperanta Studento," "Lumo," "La Suno Hispana." Por pli bone reklami la gazetojn ĉi supre cititajn, la Redakcio volonte sendos pruntedone specimenan ekzempleron al niaj abonantoj tiel dezirantaj. Volu enmeti poŝtmarkojn por sendkosto. Permesite estos teni la gazetojn unu semajnon.

## ANONCETO.

Ravensburg (Germany, Wurttemberg) Otto Muller, Juristo, Gartensstrasse 1, deziras aŭstraliajn poŝtmarkojn; sendas p.m. de la germanaj ŝtatoj aŭ bildpoŝtkartojn.

Deziras korespondadi bildpoŝtkarte.

Karel Halada, Kralupys, Vlt. apud Praha, Bohemio, Aŭstrio.

S-rino. Milka Hradilova. Praha, Kr. Vinohrady, Tablonske 'ho ul. ĉ. 10. Bohemujo.

J. Vohnysek, Svatojanski ul F. 02. Pardubice, Bohemio, Aŭstrio.

J. P. Levitsky, Rilsk, (Kursk-gub.) Russia.

P. Stukart, Pardubice, Studento, Sladkovska ul 521. Bohemio, Aŭstrio.

Josefo Burjanek, Kremsier, Post-restante, Moravio, Aŭstrio.

**Kosto de anoncioj, Sm. 25, au 3 responses coupons.**

Malgranda afero estas nur malgranda afero; sed fideleco pri malgrandaj aferoj estas granda afero.

Printed and published by J. H. Elshaug, for the Benalla Esperanto Club, Bridge St., Benalla, in the State of Victoria.

# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. I. N-RO. 12.

APRILIO, 1909.

PREZO 3 PENCOJ.

## AL NIA LEGANTOJ.

La Redaktoro bedaŭras diri ke pro profesiaj devoj, li ne povos daŭrigi la eldonon de ĉi tiu gazeto nuntempe. Dum la pasinta jaro ĝi ne ricevis la subtenadon espereblan, kaj ni devas konkludi ke ne troviĝas en Aŭstralio nuntempe sufiĉe da fervoraj esperantistaj adeptoj por pravigi la eldonon de nacia esperantista organo. Dankante sincere tiujn kamaradojn kiuj lojale helpis al la entrepreno, la Redaktoro petas ke tiuj kiuj regule ricevis la gazeton, kaj ne ankoraŭ pagis, bonvolu sendi la ŝuldatajn sumojn sen plua prokrasto. Tiuj kies pagoj superas la koston de la numeroj ricevitaj, bonvolu sciigi nin poŝtkarte, kaj ili tuj ricevos la superpagon poŝtmandate. Ni esperas ke niaj penadoj dum la pasinta jaro ne estos senprofitaj por la afero, kaj ni esprimas la esperon ke post ne longe la gazeto denove komenciĝos eble sub pli favoraj cirkonstancoj. Tial anstataŭ diri adiaŭ, ni uzas la vortojn "Ĝis revido." Ni kore dankas ĉiujn alilandajn gazetojn por la interŝanĝoj, kaj deziras al ili ĉian estontan sukceson.

## SPRITAĴO.

En amika vespera interkunveno fraŭlino legas versaĵon titolitan: "Se mi estus birdo," terure longan kaj enuigan. Ĉeestanto kiu ne ĉesas oscedi dum legaĉo de la kvazaŭ senfina poezio, ekkrias subite en kolera humoro: "Se mi havus pafilon!"

## TO OUR READERS.

The Editor regrets to say that owing to professional duties, he will not be able to continue the publication of this gazette at present. During the past year it has not received the support that might have been expected, and we have to conclude that there is not in Australia at present a sufficiency of fervent Esperantist adepts to justify the publication of a national Esperantist organ. While thanking sincerely those comrades who loyally assisted in the undertaking, the Editor requests that those who have regularly received the gazette, and have not yet paid, will kindly send the sums owing without further delay. Those whose payments exceed the cost of the numbers received, kindly inform us by postcard, and they will immediately receive the excess by postal note. We hope that our efforts during the past year will not be without profit to the Cause, and we express the hope that before long the gazette will commence again, perhaps under more favorable circumstances. For this reason, instead of saying "Adieu" we use the words "Au revoir." We heartily thank all foreign gazettes for the exchanges, and wish them every kind of success in the future.

## NOTICE.

**All Communications in connection with this Journal to be addressed to the Editor, Dr. A. E. Barrington, Benalla, Victoria, Australia.**

## PRI GYMPIE.

Eble kelkaj legantoj de la "Australian Esperantist" interesiĝas pri Gympie, Queenslando, urbo konata pro orminejoj. Antaŭ nelonge la verkanto pro komercaj aferoj troviĝis en Gympie. Ĝi estas tre pitoreska urbo, havanta loĝantaron de ĉirkaŭ 12,000. La ĉefa strato estas tre kurba kaj kruta. Vizitantoj ridis je tio, dirante, "Kia terura loko por la ĉefa strato! Kial ajn vi faris tion?" "Ho!" respondas la loĝantoj, "iam fluis tie malgranda rivereto, kaj la ministoj starigis siajn teudojn laŭ la bordoj. Pli poste konstruiĝis dometoj, kaj fine grandaj butikoj kaj hoteloj." La termezuristoj penis loki la urbon sur "Horse Shoe Bend" kie la tero estas pli ebena; sed ne! la loĝantoj preferis la eksciton de la deklivoj en Mary Strato. Frumatene la aero ĉiam estas ĉarmege freŝa, kaj de la verando de mia loĝejo en "Horse Shoe Bend" la vidaĵo estas tre bela. Oni povas vidi la urbon konstruitan sur multaj krutaj montetoj. La domoj estas lignaj, kun beletaj ĝardenoj enhavantaj grandajn "jarcanda" — kaj "mango" — arbojn. Ĉie dissemitaj ĉirkaŭ la pejzaĝo oni vidas la minkonstruaĵojn. Tamen oni ne plu trovas oron en ĉi tiu parto de la urbo. Ĉiuj ĉefaj minejoj estas nun ĉe "Monkland" malproksime ĉirkaŭ unu mejlo. Unu tagon mi malsupreniris la "Gympie Scottish" minejon. Tiu estas la plej granda minejo en Gympie. Antaŭ ol malsupreniri, mi survestis min per flava, kanvasa kostumo, kaj grandaj pezaj botoj, ankaŭ lana ĉapo. La subtera minejestro kaj mi mem eniris la kaĝon, kaj rapide atingis la 1760-futan nivelon, sed antaŭ la fino de la malsupreniro mi timis ke mia kapo krevus. Tamen mi baldaŭ resaniĝis. Ni trovis nin en longa, mallarga vojo lumigita per elektraj lampoj, kaj dum la vojaĝo al la laborejo ni pasigis knabojn kiuj ŝovis malgrandajn ŝarĝvagonojn. Unu el la laborejoj estis tre granda kaj impona. Estis grandega kaverna en la ŝtonego, lumigita per elektraj lampoj, sed tre alte, apud la tegmento, estis galerioj kie duone nudaj viroj laboris per la lumo de kandeloj. Ĝi tre similis al teatra sceno sed estis pli bela. La varmeco estis terura, kaj mi

preskaŭ fluidiĝis. Poste oni montris al mi grandan keston. Malfermite la kovrilojn, tuj vidiĝis ekbrilo de lumo. Sur la malsupra supraĵo de la kovrilo estis fiksitaĵoj da elektraj lumiloj kiuj konservis la varmon de la teo, kafo, k.t.p. apartenantaj al la ministoj. Tre bona ideo, ĉu ne vere? Ĉie eĉ se ni venis en angulon, tute subite la ministoj laboris fortege. "Mirindaĵo! kiel ili scias ke la estro alproksimiĝas?" "Rigardu," li ridis, "la telefonojn." Dum la supreniro malpura akvo disversiĝis sur niajn kapojn, kaj ni estis tre malbelaj objektoj kiam ni alvenis en la supran mondon. La junulinoj de Gympie estas famaj pro beleco, kaj la freŝeco kaj ruĝeteco de siaj vangoj. Tamen, ho ve! edziĝeblaj viroj estas malmultaj. Tial la venko iras ne al la belulino sed al la fortikulino.

Originale verkita de

J. H. CADELL.

## LA VERDA STELO.

Kiam mi unue lernadis Esperanton, kaj kredis min kapabla interparoladi kun aliaj esperantistoj; unu amiko mia, kiun mi ne ankoraŭ renkontis, ĉar ni nur amikiĝis per esperanta korespondado, sciigis min letere ke post kelkaj tagoj li vojaĝos vaporsipe al mia urbo. Por ke mi povu lin identigi li portos sur la supervesto malgrandan verdan stelon. Alvenis la ŝipo, jam elŝipigis la vojaĝintoj, sed ne troviĝis iu portanta verdan stelon. Jen subite venas junulo sar kies brusto montriĝas io, pro la mallumo nedifinebla, sed kio similas al verda stelo, kaj mi tuj kurage al li ekkriis—"Bonan vesperon al vi, kaj estu bone!" "Eh! I beg your pardon?" diris la junulo. "Mi diris, bonan vesperon al vi. Ĉu vi ne komprenas Esperanton?" "Mike," li ekkriis, vokante kunvojaĝinton, "you understand a bit of French, just see what this gent wants." Pensante ke mia amiko nur ŝercadis, mi denove demandis—"Ĉu vi ne estas sinjoro B?" "Do you understand that, Mike?" "No," diris Mike, "I think he must be an Italian." Ne utilus daŭrigi pluen, tial mi tuj faris klarigon, kompreneble angle, kaj baldaŭ trovis ke la ŝajne verda stelo estas nur mal-

gra ida, ronda, blanka anonĉajo pri ia speco vino. Post multe da ridado kaj kora manpremado ni adiaŭis unu alian, kaj la du sinjoroj promesis fariĝi fervoraj esperantistoj. Mia amiko B. poste sciigis min ke li maltrafis la ŝipon.

L. W. K. WIRTH.

### GAZETARO.

“The Esperanto Student,” a monthly magazine for American Esperantists published at 22 Meadow-road, Rutherford, N.J. Price, 50 cents a year. This excellent little periodical contains good, wholesome reading matter, written in pure classical Esperanto; also a course of instruction by Mrs. Wilbur F. Crafts, who conducted through the columns of the “Christian Herald” the largest Esperanto propaganda in the world.

“Kuba Stelo,” Organo Oficiala de la Kuba Esperantista Societo. Jarabono 5 fr.

“Dia Regno,” Monata Esperanta organo por Kristanaj Unuigoj de Junaj Viroj. Sub ĉi tiu nova titolo aperas la gazeto “Esperanto en la servo de lia Dia Regno,” kiun eldonis dum la pasinta jaro Paul Habner, Mulheim a. Rhein. Friedrich-Wilhelmster. 66 (Germanujo) Jarabono: 0,90 Sm. Ankaŭ ĉe la sama Radakcio: “Kristana Esperanta Kantareto,” li kantoj kun melodionotoj. Kiu deziras la kvarvoĉajn notojn, turnu al la ĉirita Radakcio, aldonante responsekuponon. Prezo 25 sd.

“Greklingva Esperantano,” monata revueto, oficiala organo de la Samosa Esperantista Societo. Radakcio kaj Administracio: Samosa Esp. Societo. Samos, (Azia Turkolando). Ĉiu numero kostas 12 Sd. (fr. 0'30). Redaktita esperante kaj greke. Ni deziras plej bonan sukceson al la nova gazeto.

Ni ankaŭ ricevis interŝanĝe “Rumana Esperantisto,” “Pola Esperantisto,” kaj “La Suno Hispana,” kiuj konservas sian altan gradon de bonegeco.

“Svisa Espero.” Sian sepan jaron da ekzisto “Svisa Espero” komencas kun nova formato, nova vestaĵo kaj novaj fortoj, por disvastigi la lingvon de Zamenhof. Redaktejo: 8 rue Bovy-Lysberg,

Genevo. Jara abonprezo: Sm. 1'20

“La Spritulo” estas sendube potenca kaj “grava propagandilo,” kiun ni kore rekomendas al niaj legantoj. Postulu kuraĝe tuj jara-bonon (Sm. 1'20) de la administrado de “La Spritulo”: Leipzig (Germanujo) Kornerstrato 31.

### FAJRO, AKVO KAJ HONORO.

Fajro, Akvo kaj Honoro, oni diras, iam faris interligon. Nu, ĉar Fajro neniam restas en unu loko, kaj Akvo ankaŭ ĉiam sin movadas, ili decidigis Honoron kunvojaĝi kun ili. Antaŭ ol ekiri, ili konsentis ke estas necese aranĝi iun signon per kiu ili povos sin trovi se okaze ili disiĝus. Diris Fajro “Se vi min perdus, memoru, ke ĉie ajn vi vidos fumon, tie vi nepre min trovos. Tio estas mia signo.” “Pri mi,” diris Akvo, “se mi malaperus, ne serĉu min kie la tero estas sekega. Serĉu min kie vi vidos grandajn salikojn kaj alnojn, verdajn kanojn kaj freŝan herbon. Tie mi ĉiam ĉeestos.” “Miaflanke,” ekkriis Honoro, “atentu ke vi tenu min ĉiam en la vidkampo, kaj neniam deturnu la okulojn for de mi. Ĉar, eksci—se vi nur unufoje min perdus, vi neniam, dum daŭros la mondo, povos min trovi.

trad. MARION FRASER.

### ESPERANTA KLUBO MELBOURNA.

Ĉi tiu klubo jam komencis alian jaron de laboro kun novaj esperoj kaj entuziasmo. Kluba kampfesto okazis la 13an de Marto en la Fitzroy Gardens, sed bedaŭrinde oni ne povis ĝui ĉi tiun belan lokon kaŭze de la malagrabla vetero; tamen, neniel senkuraĝigite ni luis la supran etaĝon de tevendejo, kaj post manĝeto ni aranĝis koncerton. Inter aliaj programeroj ni plezure aŭskultis fraŭlinon Tilly Aston kiu tre dolĉe kantis kelkajn esperantajn kantojn unu el kiuj ŝi ĵus ricevis el Svedujo. Ni esperas transloĝiĝi baldaŭ en pli grandajn ĉambrojn kontraŭ la centra stacidomo, Flinders Strato.

W. J. DRUMMOND,  
Sekretario,

Box No. 2, G.P.O.

## SCIIGOJ.

The Dunedin Esperanto Club has taken the opportunity afforded by the visit to that city of Mr. Aldridge, President of the Auckland Esperanto Society, to request him to give lectures on the new language. Mr. Aldridge is a strong believer in the future of Esperanto. — "N.Z. Herald."

S ro. F. H. L., Gawler, S. A. — Pro nezorgo de la presisto du vortoj estis ellasitaj: post la vorto "trankvila" devis troviĝi "lago aŭdas."

## KONSILO DE PROF. TH. CART.

Belga Esperantisto (Januaro). Interesa artikolo de F. Swagers pri organizado de Lingvaj Komisioj. Kun li tamen ni absolute ne konsentas. Laŭ nia opinio nur unu konsilon oni devas doni al Esperantistaro: Propagandu, propagandu kaj ankoraŭ propagandu! Instigi la naciajn societojn, instigi la Esperantistojn, ke ili turnu sian atenton al plibonigado de la lingvo anstataŭ al ĝia sola disvastigado estas ĉiam danĝera konsilo. Per siaj agoj, per siaj verkoj, uzante kaj uzigaute buŝe kaj skribe la lingvon (ne per teoriaj diskutoj), la Esperantistoj alportos al Akademio kaj al Lingva Komitato la necesan kaj dezirindan helpon!

TH. C.

## DEMOSTENO.

Demosteno estis la plej granda greka oratoro. Li perdis la patron, kiam li estis apenaŭ sepjara. Foje li aŭdis oratoron kaj estis ravita per la bela parolado. Li tuj decidis ankaŭ fariĝi iam oratoro. De tiu tago li ne partoprenis plu en la ludoj kaj dediĉis la tutan tempon al legado, skribado kaj parolado. Kiam li jam estis plenaĝa, li foje preparis belan paroladon kaj diris ĝin antaŭ popola kunveno. Sed oni fajfis lin kaj ŝajnis ke lia tuta penado estis vana. Malĝoja li revenis hejmen. Amiko kuragigis lin al dua provo. Li laboris ankoraŭ pli dil gente kaj pli flue diris la paroladon. Sed, ho ve, oni ree ridis lin. Kaŝinte la vizaĝon en la mantelon, li iris malespera hejmen. Alia amiko vizitis lin kaj montris al li la mankojn kaj erarojn de lia parolmaniero. Demosteno havis kiel oratoro tri ĉefajn mankojn:

unue li parolis tro mallaŭte, ĉar li havis malfortan bruston; li parolis malklare kaj kelkajn konsonantojn li tute ne povis elparoli, ekzemple R: fine li havis malbonan kutimon, ke li levis la ŝultrojn post ĉiu dirita frazo. Sed kiel forigi tion? Demosteno ne perdis la esperon. Kion oni volas, tion oni povas:

Por fortigi la bruston Demosteno suriris ĉiutage plej krutajn montojn aŭ iris al la bordo de l' maro, kiam la ondoj bruegis, kaj penis per sia voĉo superi ilian muĝon. Por bone elparoli R kaj kelkajn aliajn sonojn li metis malgrandajn ŝtonojn sub la langon kaj tiel parolis. Por forigi la kutimon levi la ŝultrojn, li pendigis super la ŝultro glavon, kiu vundis ĝin ĉiufoje, kiam ĝi leviĝis. Fine li tondis la harojn mallonge: li ne povis eliri kaj la tutan tempon devis dediĉi al siaj studoj. Per tiaj senĉesaj ekzercoj kaj penoj li fine fariĝis la plej granda oratoro de l' mondo.

D-RO KABE.

## ANONCO.

Rudolf Rieal, Wien, III./2 Gensangasse 39, Austrujo, plezurege sendos adresojn de Esperantistoj, se oni sendos al li poŝtkarton kun respondo-poŝtkarto.

## FANFARONO.

Du vaguloj interparolas:  
—Jes, amiko, mia patro mortis pro la bono de l' patrolando.  
—Kiamaniere?  
—La ekzekutisto pendigis lin.

## EMBARASANTA DEMANDO.

Ernesto revenas plorante el la lernejo domen. Lia bonkora patrino terurigante demandas:

—Kial vi ploras, fileto?  
—Ĉar la sinjor' instruisto batis min.  
—Pro kio?  
—Mi ne estis kapabla respondi je unu demando.  
—Kaj kia do estis tiu demando?  
—Li demandis, kial mi epikis pinglon en lian seĝon.

Printed and published by J. H. Elshaug, for the Benalla Esperanto Club, Bridge St., Benalla, in the State of Victoria.